Vi ricevis raporton pri la komenco de la inaŭguro, en plia sendo venis la teksto de la entuziasme akceptita fest-parolo de nia prezidanto. Jen eroj el la lasta parto de la inaŭgura solenaĵo. Sekvos aparta fotoalbumo pri la landaj salutoj, fine de la inaŭguro, kaj de la postaj programoj (Tago de Konsciigo, kiu jam pasis, Tago de Kapabligo, kiu nun okazas.

99ª UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO
Bonaero, 26 julio – 2 aŭgusto 2014



Post la prezidanta alparolo sekvis muzika paŭzo; la kungitara kanzonado de LKK-ano Nico Aloisio rekonis grandan aplaŭdon.

Sekvis bele konciza kaj trafa alparolo flanke de TEJO; Veronika Poór, kiu ligis siajn komentojn al la kongressa temo pri daŭripova evoluo; interese, ŝi tion portis enmovaden, rilate al la tre necesa daŭripovigo de nia propra movado, kies ŝlosilo estas la agadoj de ties junulara parto.



Sekvis saluto de ILEI flanke de ties prezidanto, s-ino Mirejo Grosjean, kiu raportis pri la ĵus finiĝinta Kon-ferenco de ILEI, kies inaŭguro okazis en la Nacia Parlamento de Urugvajo, kun akcepto kaj alparolo de la urbestrino de Montevideo (ĉefurbo kun 1.4 miliona ĉefurbo, de tiu kaj la direktorino de la regiona (kontinenta) oficejo de Unesko. La dua temo estis la Tria Tutmonda Kolokvo pri la Instruado de Esperanto okazonta en Neuchatel kaj La Chaux-de-Fonds en Svislando en majo, 2015.





Salutis la Prezidanto de la Akademio de Esperanto, Christer Kiselman, citante la avertajn vortojn de Zamenhof el 1914 pri la danĝeroj de naciisma pensmaniero kaj dirante, ke Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ multflanka kultura fenomeno.

Sekvis saluto de SAT kaj la landaj salutoj, pri kiuj ni raportos pere de aparta kompilota fotoalbumo.

PDF kompilita de SMG 2014-07-29. Fotoj de Marija Belošević el Kroatio.